3-a Jaro. N-o 155 APERAS SEMAJNE 22. Septembro 1927



ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris-12e Gvidanto: E. Lanty | SIDEJO de Ekzekutiva Komitato de SAT 23, rue Boyer, Paris-20e | ADMINISTREJO: Colmstr. 1, Leipzig O 27 Administranto: R. Lerchner

Laboristaj kondiĉoj en Suda Afriko

Speciale verkita por "S-ulo" de W. H. Andrews, Ĝenerala Sekretario de Suda Afrika Metisindikata Estraro.

Kvankam K-do Andrews estas tre okupita homo, li tamen cedis al nia peto kaj afable verkis ĉi-artikolon speciale por "S-ulo". Iama parlamentano, li okupis altan oficialan pozicion en la Suda Afrika Laborista Partio, sed forlasis ĝin je la apero de la mondmilito, kiam la partio subtenis spirite kaj agade la hombuĉadon.

Li kaj aliaj revoluciuloj starigis Internacian Socialistan Ligon, kiu poste fariĝis Komunista Partio. Dum kelka tempo li estis la sekretario de la K. P. kaj redaktis ties oficialan organon "International" (poste "South African Worker").

Dum sia redakteco K-do Andrews ĉiam akceptis tradukaĵojn el "S-ulo" kaj priesperantajn artikolojn. Nun li ne plu partoprenas politikajn aferojn, sed donas sian tutan tempon kaj energion al la reorganizado de la industria movado laborista en Suda Afriko kaj kiel ĝenerala sekretario de "South African Trades Union Congress" (Sudafrika Metisindikata Estraro) li faras bonan laboron ankaŭ rilate la nacian interkompreniĝon inter la nigraj kaj blankaj laboristoj.

Kvankam konata kiel "maldekstrulo" K-do Andrews eble estas unu el la plej ŝatataj gvidantoj eĉ inter la blankaj laboristoj. Estante malnova sindikatlaboranto li estas aŭtoritatulo rilate aferojn laboristajn sudafrikajn.


K-do Andrews sendas la jenan komunikaĵon:

"Salutojn al la Legantaro de "S-ulo". Ĉu mi povas esprimi mian grandan kontenton pri la progreso farita de esperanto, la internacia lingvo, kiu tiom multe faris por disrompi la naturajn lingvobarilojn? Mi antaŭenrigardas al la tempo, kiam ĝi estos la dua lingvo inter laboristoj de ĉiuj landoj."

(Subskribis) W. H. Andrews.

Mi atentigas la Legantaron, ke miaj raportoj al "S-ulo" estas tute objektivaj kaj neniel influitaj per partiaj tendencoj. Mi mem ja estas senpartiulo.

David Dambe (3958).



Tiu ĉi mallonga skizo ne celas priskribi la laborkondiĉojn en Afriko entute nek eĉ tiun parton de la kontinento, kiu povus esti ĝuste priskribita kiel Suda Afriko t. e. la tuta lando kuŝanta sude de la ekvatoro. Ĝi estos limigita al la pozicio en Unuiĝo de Suda Afriko[1]), kiu ampleksas la provincojn de Kaplando, Natalo, Transvalo kaj Oranĝio kun iuj indiĝenaj ŝtatoj, teritorioj kaj rezervoj (Basutolando, Transkei k. c.).

La loĝantaro de la Unuiĝo konsistas proksimume el jenaj: eŭropanoj[2]) 1 700 000, indiĝenoj[3]) 5 000 000, miksrasuloj 560 000, azianoj 170 000.

Holanda[4]) kaj angla estas la du oficialaj lingvoj kaj estas parolataj egalnombre de la eŭropana loĝantaro. La holanda sekcio de la loĝantaro konsistas ĉefe el bienuloj kaj farmistoj[5]). La britoj kaj aliaj eŭropanoj estas ĉefe kolektiĝintaj en la urboj kaj minejregionoj. La miksrasuloj troviĝas ĉefe en Kaplando, kaj la hindoj en Natalo.

Metisindikatismo, kiel estus atendite, estis enkondukita en la pli grandaj urboj kaj minejregionoj de la enmigrantaj ministoj kaj metiistoj el Eŭropo, Ameriko kaj Aŭstralio. Ĝi fariĝis iome grava post la anglo-boera milito kaj daŭris altiri novan aron da laboristoj, kiam ili estis ensorbitaj en modernaj industriaj kondiĉoj.

La superfluo de la holanda loĝantaro sur la farmoj ekvenis en la minadon kaj industrion dum la minlaborista striko, kiel strikrompintoj, en la jaro 1907 kaj nun fariĝis konstanta kaj grava sekcio de la industriaj laboristoj. Ili iomete estas asimiligitaj en la sindikatoj, sed ankoraŭ mankas la disciplino, kiun jarcento da industria sperteco komunikis al la transmara Laboristaro.

La trajto de la industria movado, kiu distingas la postmilitan periodon, estas la eniro, unuafoje, de la indiĝena Laboristaro en la laboristan industrian movadon.

La profundega diferenco inter la indiĝena kaj eŭropana salajro rezultas en preskaŭ kompleta socia apartigo, kvankam en ĉiu industrio kaj eĉ en la hejmoj de la blankularo indiĝenoj laboras flanke de la eŭropanoj (la mezsalajro

de la indiĝeno estas ne pli ol sesono de tiu pagata al eŭropanaj laboristoj). Politike la indiĝenoj ne partoprenas nacian aŭ lokan regadon, esceptinte Kaplandon, kaj tie nur laŭ limigita grado, tiun ĉi limigitan voĉrajton la registaro nun proponas forpreni. La registaro estas koalicio inter naciistaj agraruloj kaj reformistaj laboruloj. Tiu fakto verŝajne donis impulson al la industria organizado de la indiĝenoj kaj sub la standardo de Industria kaj Komerca Laborista Unuiĝo[6]) (I. C. U.) starigis fortajn filiojn en ĉiu parto de la lando.

Je la komenco de tiu ĉi movado la helpo kaj konsilo de la komunista partio estis bonveninta kaj serĉita de la organizantoj de I. C. U., sed antaŭ jaro ĉiuj komunistoj, ĉu nigruloj aŭ blankuloj estis eksigitaj, kaj al la membroj estas nun malpermesate aparteni al komunista partio. La paroloj de la organizantoj estas ofte tre tonfortegaj, sed agade I.C.U. fariĝis tiel reakcia kiel la eŭropanaj unuiĝoj[7]). Tamen ĝi penetris inter la indiĝenoj en la lokalizoj[8]) kaj farmbienoj je la granda ĉagreno kaj timego de la farmistoj.

La ekzisto de organizado, kiel ajn difektita, tendencas plibonigi la pozicion de la terlaboristaj indiĝenoj per la modifado de la plej egaj malbonoj de ekspluatado, kiu estas ne malpli ol sklaveco kaj povas esti tute ĝuste nomata servuto. La interrilato de la eŭropanaj kaj indiĝenaj unuiĝoj estas tia de maldense vualita malamikeco. La unuaj, kiuj estas grandparte superregitaj per la klaskunlaborada politiko de la Suda Afrika Laborista Partio, timas la subpremon de la indiĝenoj kaj kolorhaŭtulaj laboristoj kaj postulegas unuflanke por ilia geografia apartigo en difinitajn areojn kaj aliflanke la okazigon de protekta leĝdonado malpermesanta al aliaj ol eŭropanoj fari kelkajn kategoriojn de laboro (laŭ leĝprojekto).

La eŭropanaj laboristoj rifuzas kunagi aŭ eĉ konsiliĝi kun indiĝenaj aŭ kolorhaŭtulaj unuiĝoj kaj ne volas enlasi indiĝenojn aŭ kolorhaŭtulojn en la eŭropanajn unuiĝojn. La gvidantoj de la pli progresemaj sekcioj de la indiĝenaj kaj kolorhaŭtulaj laboristoj revenĝas, instigante sian sekvantaron iĝi spertaj laboristoj kaj konkuri kontraŭ la blankaj laboristoj kun la celo peli ilin el la diversaj industrioj. Tiu ĉi plano parte sukcesis, precipe en Kaplando, kie iuj sekcioj de la konstrumetio estas preskaŭ tute kaptitaj per la pli malkaraj ne-eŭropanoj. En Natalo, la tajlor- kaj meblara metio estas grandparte en la manoj de ne-eŭropanoj.

La blinda antaŭjuĝo tendencas pliiĝi, kiam la premo de la indiĝenoj en la industrioj pligrandiĝas, kaj la antagonismo de la blankuloj estas renkontita per responda rasa movado inter la indiĝenoj.

Al la malmultaj komunistaj kaj liberalaj laboristoj estas pli kaj pli malfacile akiri aŭskultadon pri racia plano de kunlaborado distingebla al la nuna antagonismo. Tiu ĉi malamikeco nun tiom antaŭeniris, ke interkonsentita pено estas farata por elradikigi ĉiujn personojn de oficialaj pozicioj en la unuiĝoj, kiuj ne konsentas al la kontraŭindiĝena manio de la burĝaj politikistoj, kiuj estas helpataj kaj eĉ incitataj de iliaj laboristaj kunliganoj.

La Sudafrika Metisindikata Estraro, kvankam kun granda hezito kaj timemo, kuraĝis iometan konstaton pri ĝia devo al ĉiuj laboristoj sudafrikaj. Ĉiaokaze ĝi sin detenis de la kruela antagonismo al indiĝenaj laboristoj montrita de politika Laboristaro. Ĝi protestis kontraŭ la traktado de indiĝenaj sindikatorganizantoj kaj kontraŭ speciala kontraŭindiĝena leĝdono kaj estis oficiale reprezentita ĉe la Kongreso de Subpremitaj Popoloj en Bruxelles. Malgraŭ sia granda modereco, traktante pri la demando, ĝi estas en danĝero detruiĝi per la malamiĝo de ĝiaj sindikatoj. Tiaj unuiĝoj kiel: tipografia, de lokomotivestroj kaj hejtistoj, komunuma kaj de bankdungitoj, fervoj- kaj ĉiuj registardungitoj konstante rifuzis aliĝi kaj la minejlaborista unuiĝo ankaŭ sin tenis aparte. Post dujara aliĝo, la Unuigita Maŝinista Unuiĝo voĉdonis kontraŭ plua aliĝo kaj nur per penega propagando alia grava unuiĝo, Unuigita Societo de Lignaĵlaboristoj, estis retenita. Aliaj unuiĝoj malkvietiĝas sub kio oni nomas la nigra laborista politiko de la Estraro.

La pozicio estas ekstreme malfacila en la momento, ega reakcio furiozas en preskaŭ ĉiuj unuiĝadministrantaroj, kaj nur per plej granda malfacileco la malmultaj maldekstrulaj elementoj konservas sian pozicion.

Elangligis: *Trinaŭkvinok.*

Rimarkoj de l' tradukinto:

1) — Union of South Africa, mallonge = Unuiĝo.

2), 3) — en Suda Afriko ĉiuj blankuloj estas nomataj eŭropanoj, ĉiuj negroj — indiĝenoj = natives (netivs).

4) — vere nur holanda ĵargono — "afrikaans".

5) — bienuloj kaj farmistoj = boeroj. Ofte ĉiuj holandanoj estas nomataj boeroj.

6) — Industrial and Comercial Workers' Union.

7) — Ĉefgvidanto de I. C. U. deklaris, ke la striko estas malnoviĝinta ilo por laboristoj.

8) —?— angle: location (lokesin) = loĝejloko rezervita por indiĝenoj borde de la urboj aŭ apud minejoj.

La rekonstruado de la Sofia "katedralo"

Dum aliloke oni detruas templojn aŭ transformas ilin je muzeoj, dum en pli malnovaj kaj bonordigitaj regnoj oni ruinigas tutajn kvartalojn, por krei novajn bulvardojn aŭ placojn, en Bulgario oni faris tutan orientan demandon el la restarigo de jam detruita preĝejo, kiu tamen tute ne havas ian arĥeologian valoron.

La tuta publika opinio ja estas kontraŭ la rekonstruado de la preĝejo sur la sama loko, unue, por ne rememorigi la "nigran daton de la infera krimo" — la 16. 4. 25 — kaj due, por plibeligi la placon, kiu okupas ĝuste la centron de Sofia, la plej belan lokon de la ĉefurbo. La komuna deziro de ĉiuj — de teknikistoj, publicistoj, ŝtatuloj, parlamento — estis ne restarigi tiun templon. Eĉ la registara gazetaro atakis la deziron de la eklezia medioj pri restarigo, kaj la parlamento malakceptis la proponon doni 1 milionon da bulg. levoj helpe por la konstruo.

La pastraro tamen ĉiumaniere agis, ĝi vokis la malbenon de l' ĉieloj sur ĉiujn, kiuj insistis kaj insistas, ke tiu "dia loĝejo" estu konstruita aliloke. La monaĥa obstino montriĝis en sia tuta forto, ĝi eĉ minacis per malobeo je ĉiuj estraroj kaj leĝoj, altrudante sin je ĉiu prezo, kvankam Bulgario ne estas klerikala ŝtato. Helpis al ĝi ia virina ligo "Amo al la Patrio" kaj faŝista societo "Patria defendo", kiu eĉ minacis per mortigo ĉiujn kontraŭulojn.

Granda estis la batalo inter la prudento kaj la obstino, inter la kulturaj, estetikaj k. a. bezonoj kaj la fanatikeco de kelkaj komercistoj de religio kaj falsa patriotismo. Tutan monaton daŭris tiu teda disputo — donkiĥota batalo por kaj kontraŭ la restarigo de la detruita ĉefpreĝejo "Sveta Nedelja" ("Sankta Dimanĉo", antaŭe nomata "Sankta Kral" laŭ la nomo de iu fremda reĝo-diboĉulo) kaj fine... venkis la malnovo: La Centra Ĉefurba Konsilantaro anstataŭ plenumi sian devon laŭ la "leĝoj kaj regularoj" — kvazaŭ tiujn devas obei nur la "amaso" — decidis subteni la pastraron — kial malamikiĝi kun tiu "spirita instituto", tenanta la "ŝafaron" en malklero, tiel necesa por daŭrigo de la regado kaj ekspluatado?! — kaj la preĝejo estos restarigita... Kompreneble, al ili ĉio ĉi nenion kostos, — la milionoj por la grandega konstruo estos serĉataj kaj certe estos prenotaj ree de la bulgaraj impostpagantoj, de la subpremata popolo, kontraŭ kies kategoria deziro oni konstruos. Kaj kiu rajtigas iujn ministrojn kaj ĉefpastrojn tuŝi la poŝojn de la impostpagantoj kaj elspezaĉi milionojn da levoj por "katedraloj" antaŭ ol pagi la ŝtatajn oficistojn kaj pensiulojn?! Kaj kia bezono estas sentata de "nova preĝejo" ĉe tiom da liberaj preĝejoj, kiuj

eĉ festotage estas dezertaj?! Kial lasi la popolon malsati, kaj foruzi dekon da milionoj por rekonstrui superfluaĵon?!

"Jes, la 'Sveta Nedelja' estos restarigita, — konkludas tiuokaze gazeto "Nakovalnja" (Amboso), sed tio, kion oni neniam plu sukcesos restarigi, estas: la fido popola en la ekleziaj reprezentantoj kaj iliaj profitemaj aŭ hipokritaj defendantoj, estas: la aŭtoritato entute de la eklezio kaj religio. "Sveta Nedelja" estos rekonstruita, sed la trompa kristaneco restos por ĉiam ruinigita en la koroj de la lastaj kredantoj.

La venko de la epitropoj (prioroj) do estas Pirusa venko, t. e. pli malbona ol malvenko. *I. H. K.*

PS. Jen afero por plendi. Jen kontraŭ kio devus rezolucii kaj protesti ankaŭ la B. E. A. en sia ĉi-jara kongreso, anstataŭ tiel naive sin turni por malgrandigo de la bulgariaj ŝarĝoj al la Societo de Nacioj (pli vere de Akcioj). Ĉar se ni mem *ne* ŝparas, aliaj tute ne zorgos pri ni!

Germanio super ĉio!

"Ĉion por la patrolando! Certe estos dankema la patrolando al la kuraĝuloj! Ĉiu germano havas la saman rajton laŭ leĝaro! Preĝu kaj laboru!" — Tiajn kaj similajn parolojn oni aŭdis dum la granda buĉado, nomita mondmilito! Sennombra nomaro estas gravurita sur



"tabulo de l' honoro". Grandega amaso da kadavroj putras por la "dankemaj patrolandoj". Kripluloj vivaĉas en *ĉiuj* landoj. Senlaboruloj malsatas ĉiuloke.

La kapitalistoj denove ekaranĝas buĉadon. Denove riveregoj sangoplenaj ekfluos en ĉiuj anguloj de la mondo! En Germanio aro da "amikoj de la patrolando" helpas aranĝi la "belegan militon".

Laboruloj el ĉiuj landoj! Ĉu vi forgesis ĉion?! Ĉu vi denove estas pretaj, partopreni militadon de laboristoj kontraŭ laboristoj!? Ne forgesu la barbarecon de 1914—1918! Ne francoj, germanoj, angloj, rusoj; aŭ nigruloj, flavuloj, brunuloj, blankuloj ekzistas en la mondo; ne la patrolando kaj dio estas nia celo, sed por ni ekzistas nur homaro, konsistanta el sklavoj kaj "mastroj"! — Jen mallonga skizo pri "rekompenco" por ambaŭ klasoj (statistikoj el *"Mahnruf"*, organo de I. L. H.). Oni pagas:

al 1 514 033 personoj (idoj, gepatroj, edzinoj de mortintaj soldatoj) (en 1927)	387 000 000	mk. g.
meze al persono	256	„
al 786 660 militvunditoj, maljunuloj ktp.	310 000 000	„
meze al persono	394	„
al 40 020 estintaj oficiroj, oficistoj ktp. (el imperiestraj tempoj; armeo kaj ŝiparo)	160 897 800	„
meze al persono	4 024	„
al 22 022 vidvinoj kaj orfoj (de oficiroj kaj oficistoj	49 543 400	„
meze al persono	2 249	„
al 1753 generaloj (heredaĵo de "Grandgermanio!")	21 359 000	„
meze al persono	12 192	„
al 104 eksministroj kaj similaj "sinjoroj"	1 736 000	„
meze al persono	16 700	„

Jen alia ekzemplo pri "salajro" en *"respubliko"* plej libera!

Oni pagas jare al:

la germana regno-kanceliero	30 000	mk. g.
direktoro (Reiniker)	70 000	„
„ (Gebbert)	94 000	„
„ (Schall)	100 000	„
„ de minejo en Supra-Silezio	36 000	„
„ ("Wessel-koncern")	60 000	„
ĉefdirektoro (en Westphalen)	120 000	„
1-a direktoro	72 000	„
2-a „	36 000	„
mineja inspektoro	24 000	„
sub-direktoro	12 000	„
ministo	2 100	„

Gek-doj! Ĉu vi nun kredas, ke militadon ni mem devas subteni!? Jes, ni kontraŭbatalu la kapitalistaron tutmondan. *(1851)*

Se vi deziras profundiĝi en la materion de "Sennaciismo", vi nepre aĉetu kaj legu la 2-an eldonon de

A. B. C.

de Sennaciismo

Mendebla ĉe Administracio de SAT, Colmstr. 1, Leipzig O 27.

EL BULGARIO

Novaj viktimoj de la blanka teroro

La registaro, dezirante regi pli longe, tre ofte alarmas la en- kaj eksterlandan publikan opinion pri novaj konspiroj. Ordinare tio estas fiktivaj malkovraĵoj. Je la fino de la pasinta jaro ili estis ĉiutagaj, kaj novaj centoj da komunistoj eniris en la malliberejojn, turmentitaj ĝismorte.

Malfeliĉe ni vivas en Oriento, kie ĉio, neebla laŭ okcidenta kutimo, estas io tre ordinare. La viktimoj trapasas diversajn fazojn de policesploroj, kiuj tro superas tiujn de mezepokaj inkviziciaj tempoj. Oftaj sinjetoj de malliberigitoj el diversetaĝaj policejoj parolas pri eksterordinaraj terurajoj.

Venis printempo, kaj kune kun ĝi — novaj politikprocesoj kontraŭ C. K. de Kompartio kaj Komsomolo, kiel ĉeno de longa procesĉenaro. La eksterlandaj K-doj, mi kredas, estas bone informitaj de la laborista gazetaro pri la inda sintenado de niaj sofiaj K-doj antaŭ la juĝistoj. Pri la tiama atmosfero oni povas konkludi de la persekutoj kaj forpelo de l' advokatoj Rozenfeld kaj Richter, venintaj el Germanio kaj Aŭstrio, kiel juĝdefendintoj de niaj sofiaj K-doj. Kelkajn semajnojn poste, la Haskova distrikta Tribunalo kondamnis aliajn 12 personojn nur pro iliaj komunistaj konvinkoj. Ili ĉiuj travivis la provincan turmentadon, kaj post 7-monata aresto, starigitaj antaŭ la juĝantaro, ili respondis fiere, ne kaŝante siajn konvinkojn.

La tribunalo, malgraŭ ke ĝi estis civila, tute similis al militista. La fakto, ke 40 personoj estis esploritaj nur dum unu tago, sufiĉe parolas pri tio. Videbliĝas, ke la juĝverdikto estas antaŭe preparita — ĝi troviĝis en la kesto de la juĝtablo, kaj nur proforme oni procedis.

La morgaŭan matenon la prezidanto ceremonie tralegis la verdikton per kiu estis kondamnitaj je po 5 jaroj da mallibero kaj 50 000 levoj da "imposto" sekvantaj K-doj: Dimitar Altaparmakov, Georgi Atasanov, Todor Kirkov, Canko Kozlov, Georgi Gaĝev, — SAT-ano, Kosta Velev, Nikola Velev, Ivan Samanĝiev, Angel Konstantinov, Todor Mazgalov, Dimitar Kolev kaj Mehmed Ismailov — turko.

Ĉiuj K-doj renkontis la kondamnon fiere kaj enirinte denove en malliberejon, ili frate salutis la batalantan Laboristaron, kredante samtempe, ke ĝi per protestkunvenoj kontraŭ la registaro postulos politikamnestion kaj nuligon de la "Leĝo por Ŝtatdefendo." *Ardin.*

Fermu viajn leterojn per niaj sigelmarkoj.
Prezo: 100 pecoj 1.— mk. g.
Administracio de SAT.

Jugoslavio — lando, kie oni mortas pro malsato

"Milojn minacas morto" — tiun titolon enpresis per grandaj literoj burĝa ĵurnalo *"Jutarnji list"* (Matena ĵurnalo). Do, ne estas tio iu komunista trompaĵo: burĝoj mem konfesas tiun staton kaj mem estas ektimigitaj vidante sekvojn de sia politiko. Nun ili ĉiuj fariĝis filantropaj kaj kolektas monerojn por helpi al malsatantoj — sed ne pensu, ke nia burĝaro eble volas korekti siajn ĝisnunajn erarojn kaj komenci novan politikon, kiu estus en intereso de larĝaj popolamasoj.

Timo de eventuala epidemio kaj speciale timo de malsataj personoj, kiuj nun ekvidis la hipokritecon de reganta klaso, devigis organizi ian helpon. Ĉu tiu helpo sukcesos? Dubinda afero.

En nia feliĉa "putrujo", kie la riĉeco de kamparo kaj montaro estas nekalkulebla, unu granda parto da loĝantaro forgesis jam kiel aspektas pano kaj kiel varmigas fajro.

Hercegovino nomiĝas tiu mizera regiono, kie "jam kelkajn semajnojn en plej granda parto da vilaĝoj oni ne bruligis fajron". Tiel skribas burĝaj gazetoj. Kaj fajro estas bezona, bezonega ne nur por kuiri (oni ne havas ion kuirotan), sed por defendi siajn nudajn korpojn kontraŭ malvarmo. En tiu ŝtonoplena montaro monato majo estas malvarma, iam eĉ neĝo falas.

Ŝelo de arboj kaj herbaĵo estas nutraĵo de tiuj homoj — ne kredebla afero — sed *burĝoj konfesas!* En XX-a jarcento, en plej riĉa lando sur Balkana duoninsulo, en periodo de "paca kaj normala" disvolviĝo tio okazas, kaj laŭ sciigoj (de burĝaro mem) jam kelkaj homoj mortis.

Reprezentanto de registaro telegrafis en Beograd, ke li ne povas respondi pri sekvoj de tia stato kaj ke oni urĝe helpu.

Burĝaro ektimigita ne sciis kion fari kaj jen venas sama telegramo el Bosnio el urboj Banja Luka kaj Tuzla, kie oni priskribas saman situacion en tiuj regionoj.

"Fantomo ĉirkaŭvagas Jugoslavion, fantomo de malsato kaj senlaboreco" — tion oni povas nun diri pri ŝtato, kie burĝa diktatoreco triumfas.

Paralele kun tiu bildo registaro elspezas monon por novaj militarmiĝoj, por progresigo de militaviado. Oni jam aĉetis aron da aeroplanoj por defendo de Beograd kaj ili estis salutitaj kiel nia (ne laborista!) plej bona defendanto kontraŭ malamikoj. Zagreb same baldaŭ ekposedos siajn aeroplanojn.

Oni elspezas monon por progresigo de l' "juna aviado" kaj sendas aeroplanon en Kalkuta'n, por ke ĝi ĉie montru trikoloran flagon de jugoslavia burĝaro.

Same oni skribis pri alveno de Wrangel-anoj, kiujn forpelis Turkio — kaj por ili oni *devas* trovi okupon, ili ne devas ja morti pro malsato — ordonas Francio!

Kaj ni laboristoj kaj kamparanoj turmentitaj ne atendas burĝan helpon, sed rigardas kreskon de nia pugno kiu iam forpelos al diablo por ĉiam niajn ekspluatistojn.

BuBo.



Letero el Turkio

Veninte antaŭ du jaroj al Turkio, mi nur kelkajn piastrojn havis en poŝo. Do, se mi ne volis ŝteli aŭ almozpeti mi devis akcepti laboron, kiu estis sufiĉe malsimpatia por mi. Malsimpatia pro la malmulta salajro kaj tro longa labortempo. Mi estis dungita por 50 liroj (monata salajro), kaj laboris tage 12 horojn. Kion fari? Miaj rimedoj estis elĉerpitaj kaj miaj vestaĵoj nur pro iaj mirindaj kaŭzoj ne estis jam disfalintaj. Mi tiutempe certe faris tre suspektan impreson kaj mi konsideris tiun laboron nur kiel okazon por perlabori novan vestaĵon kaj iom da mono, kaj poste tuj daŭrigi mian vojon. Ĝis nun mi ne faris tiel kaj oni vidos kial. La fabriko, en kiu mi nun ankoraŭ laboras, produktas karbacidon kaj oksigenon. Ĝi ne estas tre granda, sed sufiĉas por la turka komerco. Por interesemuloj mi povas diri, ke ĝi produktas en 24 horoj aŭ 150 kubmetrojn da oksigeno aŭ 2000 kg. da karbacido maksimume. Kiam mi komencis, ni dum monato ofte laboris ne pli ol unu aŭ du semajnojn. Tio iomete konsolis min, ĉar kiam la maŝinoj ne funkciis, nia labortempo estis nur 7½ horoj tage. Mia okupo estis tre diversa kaj ankaŭ interesa. Diversaj difektoj okazintaj dum la laborprocedo devis esti riparitaj, oni devis purigi la valvojn, kontroli la diversajn aksojn, krankojn ktp. Neniam antaŭe mi estis farinta tian laboron, sed iom post iom mi adaptiĝis kaj enpenetris en la laborprocedojn. Tre malagrabla cirkonstanco por mi estis tio, ke dum somero la kompresoroj kaj generatoroj (gasfornoj) elradiis grandan varmon. Ĝenerale la laboro ne havis tian febran rapidecon kiel en eŭropaj fabrikoj kaj tio estis bona.

Tiel la tempo pasis, ĝis komenco de jaro 1926. Rimarki mi ankoraŭ devas, ke mi tie estis la sola fremdulo. Do, je tiu tempo la turka registaro ekhavis atakojn de "reformmanio". Ĝi ordonis novajn leĝojn, malpermesis malnovajn morojn, enkondukis lertan impostsistemon simile al ĝia granda najbaro kaj ankaŭ dekretis, ke ĉiuj eksterlandanoj, kiuj laboras en turkaj entreprenoj, devas esti anstataŭitaj de turkoj. Limigita escepto estis nur por nepre bezonaj specialistoj. Oni ne konsideris min kiel specialiston kaj mi estis sur pavimo. Mia impostŝuldo al la turka ŝtato havis la altecon de 35 liroj kaj mi tute ne pensis ĵeti la monon en la registaran faŭkon, mi decidis forkuri kontrabandmaniere. Resume mi nur ĉi tie diras, ke mia bela intenco bedaŭrinde ne efektiviĝis. Sur duona vojo al Angora mi estis haltigita kaj devis reveni Stambul'on. Kun aliaj senlaboraj K-doj mi trapasis la sekvantajn tagojn en la kvartalo de Galata, kie estas la fokuso de malriĉeco, mizero kaj malvirto. Mi vagadis ofte en la haveno, por trovi konvenan ŝipon kaj forŝteliĝi per ĝi, sed mi ne havis ŝancon. Kelkfoje mi sukcesis kaŝi min en ĝi, sed antaŭ la forveturo oni ĉiam ekspedis min eksteren kun tuta serio da malbenoj kaj minacoj...

En tiu tempo komenciĝis la krizo kun Italio, la turkoj mobiliziĝis kaj mi ricevis sciigon ke, se mi volas, mi denove povas okupi mian estintan postenon. Intertempe ankaŭ la turkoj rimarkis, ke ili ne povas tiel rapide, kiel ili volis, anstataŭi la fremdajn laboristojn per propraj kulioj kaj konsekvence malpli severe agis laŭ la dekreto. Ili cetere en multaj aliaj rilatoj devis fari "koncesiojn" al la progreso. Mi nur mencias la diversajn provojn kaj projektojn koncerne la enkondukon de latina alfabeto. Nenia rezulto estis, eĉ tiurilate ili malprogresis. La publikaj surskriboj antaŭe dulingve, turke kaj france, estas nun nur turke skribitaj. Escepto estas nur tie, kie la forigo de la franclingva teksto kostus tro multe da mono, aŭ pro reklamaj kaŭzoj. (Aeroplan-loterio, poŝtmarkoj ktp.)

Mi komencis denove la laboron kaj kiam la minacanta militdanĝero malaperis kaj nia dua *Usta* (partiestro) revenis de militservo, mi fariĝis riparisto kun salajro de 75 liroj kaj 9-hora labortago. Ke mia ĉefo ne volonte konsentis en tio, mi apenaŭ bezonas diri, sed ĉar mi estas fraŭlo, mi povis riski, fari skandalon ne bezonante timi eventualan senlaborecon. Diri mi devas ankaŭ, ke laboristaj sindikatoj ne estas permesataj, se ili bazas sur klasbatalo. Konataj estas al mi la sindikatoj, aŭ pli ĝuste senkoloraj unuiĝoj de *Hammal* (ŝarĝportistoj) *Arabadĝi* (veturigistoj), kaj *Mahonadĝi* (ŝipistoj). La du unuaj ekzistis jam en sultana tempo, kaj la ofico de *Ustabaŝi* en kelkaj jaroj akiras tiom, ke ili povas vivi oportune, ne movante eĉ fingreton.

Do mia laboro nun pli plaĉas al mi. Kvankam mia salajro ne estas alta, mi nun tamen povas ŝpari iom da mono, kio antaŭe ne estis ebla. La vivkostoj en Konstantinopolo ŝancelas inter 30 kaj 40 liroj monate, se oni iomete ŝparas. Ne klarigeble estas al mi, kiel vivas la diversaj malgrandaj oficistoj, kiuj ricevas nur 35—40 lirojn kaj havas familion, aŭ skribistinoj en bankoj, kiuj kelkfoje nur ricevas "salajron" de 25 liroj.

La spirita vivo ĉi tie estas tre malvasta, ĉiujn progresemajn ideojn oni efektive nur trovas en la eksterlanda gazetaro, kie oni pompe rakontas pri reformoj en nova Turkio. Tio, kio en Turkio estas nova, estas la ŝajnigo de instruiteco kaj kulturo, kiu bedaŭrinde nur kopias ĉion malbonan kaj sensencan

el tio, kio venas de ekstere. La granda amaso de Konstantinopola loĝantaro estas nur eŭrope vestita kaj pro tio ĉiuj fariĝis arogantaj malsaĝuloj. Muzikaj distraĵoj estas reprezentataj per eŭropaj fokstrotoj, ĉarlstonoj kaj turka nacia muziko. Kiel ĉi lasta sonas, povas ekpruvi ĉiu K-do, kiu posedas radioaparaton. Mi persone jam alkutimiĝis al ĝia belsoneco kaj povas aŭskulti ĝin, ne ricevante cerban difekton.

Esperanta movado vegetas modeste. Malnovaj pioniroj ĉefe estas rusoj kaj hispanaj hebreoj, turkoj ĝis nun ne multe interesiĝis[1]). SAT-movado ne ekzistas, ĉar pro personaj kaj geografiaj kaŭzoj la opaj SAT-anoj agas individue. Pri laborebleco mi respondas ĉi tie komune al ĉiuj K-doj kaj samideanoj, kiuj estis tiel forgesemaj kaj ne almetis en letero respondkuponon. Tiaj demandoj venis al mi ĉefe el Mez-Eŭropo. Estas vere, ke oni konstruas multe da fabrikoj, elektraj stacioj, fervojoj, tuneloj ktp. Sed estas jam multe pli da laborserĉantoj en Turkio, ol oni bezonas, sekve de tio la salajroj tre malaltiĝis. Miaj amikoj en Angora skribas, ke laboro ne estas, ili ĉiuj estas senlaboraj, kvankam ili konas jam ĉiujn firmojn kiuj disdonas laboron. En Stambul estas simile, nenia laboro. Do al ĉiuj, kiuj volas serĉi ĉi tie la feliĉon kaj trovi la trezorojn, kiuj estas priskribitaj en 1001 nokto, mi diras: ŝparu vian energion, ĉar eble vi trovos la malarion, la marĉfebron kaj nenion plu. Kaj se estas riskemuloj, kiuj malgraŭ ĉio volas veni, nu tio estas ilia afero kaj povas esti, ke ili havos ŝancon kaj trovos bonan laboron aŭ okupon.

Milcent Okdek Ses.

[1]) Mi devas iom kontraŭdiri la raportanton. En junio 1926 mi estis en Konstantinopolo kaj trovis tie tridekon da geesp-istoj: 3 turkoj, 2 bulgaroj, kelkaj rusoj, poloj, grekoj, germanoj, aŭstroj, hungaroj, holandanoj, angloj kaj izraelidoj. Esp.-Delegitaro vizitis la Ministron de Publika Instruado, Neĝati-bej, prezentis al li esp.-raporton, kaj li promesis subteni nin. Turka Esp. Asocio jam funkcias. Kunvenejo en hotelo "Rubin", Tepe Baŝi. *I. H. K.*

MEKSIKIO

La nuna stato de la laboristmovado

Unu el la principoj de nia organizo estas la jena: Kontraŭ ĉiu sindikato de CROM (la regiona meksikia laboristligo de reformista tendenco, kiu inklinas al la Amsterdama Internacio) estu starigata sindikato de CGT (la ĝenerala sindikatligo aniĝinta al ILL).

Pro la ampleksaj propagand-vojaĝoj, faritaj de delegito de l' CGT tra la tuta lando, kelkaj sindikatoj transiris al la CGT; same nia propagandado en fabrikoj kaj laborejoj kontraŭ la CROM havis bonan sukceson, tiel ke kelkaj aniĝoj al nia organizo okazis. Sed la CROM estas ĉi organizo, kiu devas defendi la interesojn de la burĝaro kaj de la estraroj kaj pro tio ĝi kapablis, kvankam ĝin malboneco kiel laboristorganizo estas senduba, koncentri ĉiujn siajn politikajn fortojn kaj defendi sin. Ĉi politikaj influoj kaj la protekto flanke de la registaro kaj de la entreprenistaro savis la CROM-on de la ruiniĝo. Ĝi posedas pli malpli grandan kontrolon je la Laboristaro en ĉi ŝtatoj, kie ĝia laborista partio estas forta; en la ŝtatoj Puebla, Veracruz kaj Coahnila ĉi laboristpartio perdis multe pro siaj daŭraj perfidoj; en Tamanlipas ĝi estas tute malestimata de la laboristoj.

La sistemo kreskanta sub la politiko de Plutarco Elias Calles, la prezidanto de la respubliko, kaj la meksiklanda eklezio efikis, ke la eklezio mem dekretis bojkoton de la tuta produktado. Elias Calles celas nepre kontroli la religiajn funkciojn per sia registaro; la klerikularo male ne volas rezigni pri sia influo kaj celas teni la ekspluatadon de l' popolo en siaj propraj manoj. Kaj tiel ekestis ĉi bojkoto, pro ties sekvoj kompreneble la labora popolo ege suferas. Pro ĉi bojkoto la entreprenistoj kaj precipe tiuj de la grandaj teksejoj plendis pri troa produktado kaj komencis redukti la funkciadon de l' fabrikoj kaj malpligrandigi la personaron aŭ la labortempon. Nuntempe oni laboras en la teksejoj tri, kvar aŭ kvin tagojn posemajne, kvankam la personaro preskaŭ ne estas malplimultigita. Ĉi katolika bojkoto servis al la tuta burĝaro kiel preteksto por la malaltigo de l' salajroj kaj la mallongigo de la labortempo. Strikoj kaŭzitaj per la laborkondiĉoj de ĉi preteksto "troa produktado" pasis por la bono de l' entreprenistaro. Aliflanke ne estas nekonate, ke la malbona ekonomia situacio paralizas la agemon de l' amasoj; kaj, inter alia, pro ĉi malbona stato la CGT ne progresis en lasta tempo malgraŭ ĉiuj penadoj kaj sia revolucia taktiko. Ni preskaŭ ne kapablis kontraŭi la atakojn; kaj oni ne devas forgesi ĉe la kritiko de nia stato, ke ni disponis pri nur malsufiĉaj rimedoj. La lokaj federacioj apenaŭ posedis sufiĉe por kontentigi la proprajn multspecajn bezonojn.

La fervojista striko

En Meksikio ekzistas du fervojistaj organizoj:

1. La Confederacion Ferrocarillera Mexicana (Federacio de la Meksikiaj fervojistoj), fondita en 1921, kiu ŝanĝis sian nomon dum la lasta kongreso al: Confederacion de Transportes y Communicaciones (Federacio por la transporto kaj la trafika industrio). Ĉi organizo estas sendependa, sed tre simpatiis kun la CGT, kiu rezultas el la fakto, ke ĝi invitis al sia lasta kongreso delegiton de la CGT; ĉi delegito partoprenis la kongreson.

2. Antaŭ ĉ. unu jaro la CROM estas fondinta pseŭdan fervojistan organizon sub la nomo: Federacion Nacional Ferrocalera (Nacia fervojista federacio). Ĉi organizo estas reformista. Ĝi ofte sin turnas kontraŭ la interesoj de la laboristoj kaj pledas por la interesoj de l'ŝtato. Tio montriĝis, kiam la mekanikista unuiĝo, kiu estas aniĝinta al ĉi lasta federacio, postulis salajraltigon kaj post rifuzo de ĉi postulo volis striki. La nacia fervojista federacio estis kontraŭ ĉi striko, sed ne povis malebligi ĝin. Al la strikantoj oni rifuzis la subtenon de la federacio kaj la estraro de CROM eĉ deklaris per sia sekretario kaj prezidanta aspiranto Morones la strikon — kontraŭleĝa! Morones ja estis ministro!

La CGT sin okupis pri la striko kaj rekomendis al la fervojistoj la ĝeneralstrikon. Ĉi propono tamen ne estis akceptita. Kvar monatoj pli poste, kiam la striko ankoraŭ daŭris, la solidareca striko estis decidita de la CGT sola. Sendube niaj K-doj faris ĉion por ĝeneraligi la agadon; sed sukceso ne estis ebla, ĉar la reformistaj sindikatoj sabotis la ĝeneralstrikon kaj havis por tio la helpon de la ŝtataj estraroj, kiuj arestis kaj persekutadis niajn K-dojn. Ĉiukaze la pozicio de niaj K-doj tamen plue vivas kiel brila solidareca agado, dum la perfidema pozicio de la CROM estas rifuzita de la laboristoj. Fakte montras sin, ke unu sindikato post la alia eksiĝas el CROM kaj transiras al CGT.

Post subpremo de l' batalo la fervojistoj sin turnis al la juĝejoj kaj esperas per tio sukcesi iomete. Sed ĉi espero certe trompos ilin.

La movado en la kamplaboristaro

La kamplaborista federacio, fondita en 1926 de la CGT, estas stariginta la principojn pri eksproprigo de l' tero per la kamplaboristoj. En El Sance (en la ŝtato Veracruz) la kamplaboristaj societoj efektivigis la decidojn de l' kongreso kaj eksproprigis la teron. Ĝis nun ili povis kontraŭstari al la soldatoj senditaj de la registaro. Inter la societoj regas stato de frateco kaj komuneco, kiu rajtigas nin al la plej bonaj esperoj.

Persekutoj

La responda redaktoro de nia meksikia revuo "Sagitario", K-do Librado Rivera, estis arestita kune kun la K-doj Predo Gudino kaj Florentino Ibara. Dum ĉi okazo la presejo estis detruita per la polico. La ruinigita sanstato de l' K-do Rivera igas nin timi ĉe longdaŭra aresto la plej malbonan.

Laŭ la Informservo de ILA.

MIA VIVO

Mi naskiĝis en vilaĝo. Miaj gepatroj estas malriĉaj poŝtlaboristoj. Nia familio konsistas el: patro 50-jara, patrino 48-jara senpartiaj kaj senkredaj, frato 22-jara, lernas en Sovet-partia lernejo, fratino 21-jara, sekretariino de vilaĝa soveto, ambaŭ membroj de V.Z.K.S.M., kaj mi. Krom tio mi havis ankoraŭ du fratojn, membrojn de kompartio, sed ili mortis, la unua en la Ruĝa Armeo, la dua pro troa laborado.

Mi loĝas en vilaĝo la tutan tempon. Nun mi estas 20-jara, lernis en meza lernejo, kaj je 16 jaroj mi laboris en la telegraf-poŝtejo kiel telegrafisto. Mi estas membro de Komunista Junulara Unuiĝo, laboristo kaj agitisto de kompartio. En 1925 mi direktis min al politika kleriga laboro, kie mi nun laboras.



Mia regiono havas 25 vilaĝojn kun 16 000 loĝantoj, plejparte terkulturistoj. Ĝis la proletara revolucio 50% de la tero apartenis al bienuloj, nun ĉio estas transdonita al la terkulturistoj. Ĝis la revolucio la vilaĝanoj ne vidis kulturan laboron, kaj lernejoj estis ĉefe en urboj. Nun estas 16 vilaĝaj lernejoj kaj 10 lernejoj por maturaĝaj analfabetuloj, 2 vilaĝaj kluboj kaj 12 "Ruĝaj anguletoj" (legofako). Ni havas 5 kooperativojn, 1 komunon, 4 kolektivojn.

Mi laboras privatan laboron kaj sovetan. Mia laborpago estas 43 rubloj kaj honorario pro kunlaboro en gazeto 10—12 rubloj monate. Mi havas bonan loĝejon, manĝon kaj ŝparon.

Esperanton mi lernis en 1923, aliĝis al SAT nunan jaron. Mi faris montrejon "Esperanto" kaj organizas rondeton de SAT.

Mi ricevas multajn leterojn el la tutmondo, kiuj parolas al mi pri la vivo de la laborista klaso.

Boris Stefanov (7786)
Viŝne-Dolgoje, Orlov. gub., Sovetio.



Soldata renkontiĝo

(Interfratiĝo de aŭstriaj soldatoj kaj laboristoj.)

Eble nia redaktoro pli ŝatus ricevi nur koncizan raporton pri fakto. Tamen mi riskas vane traduki ĉi artikolon, ĉar mi pensas, ke ĝi ne nur bone montras la spiriton, kiu regas la plej multajn el niaj armeanoj aŭ pli ĝuste pro la ĉikanoj de reakciemaj oficiroj, sed ankaŭ nian manieron aranĝi proletarajn festojn. La tutmonda sennaciularo do certe ankaŭ interesiĝas pri tiaj priskriboj.

La 16-an de junio 1927, kristkorpa tago. Gmunden, urbeto apud la lago Traŭnsee en fama Salzkammergut. Mateno. De la fervoja stacio eksonas marŝmuziko kaj tuj poste konata marŝkanto de liberaj gimnastikuloj.

Okazas la unua renkontiĝo de la respublikanaj soldatoj en supera Aŭstrio. Antaŭ 2 semajnoj tra la kazernoj flugis folieto kaj nun 600 soldatoj sekvis la inviton de iliaj organizoj. Ritmaj paŝoj sonas tra la stratoj de Gmunden. Kantoj salutas la Traŭnstein (monto 1691-metra), la lokon de la kunveno. Ĉe la bordo de la lago kora salutado kaj poste vaporŝipo portas la soldatojn kun centoj da parencoj kaj gastoj trans la lagon. La loka grupo de la "naturamikoj" estas konstruanta ŝirmdomon sur la monto. En la valo kuŝas amaso da konstrumaterialo, transportota surdorse sur la monton (veturebla vojo mankas). La prezidanto de la naturamika grupo petas pri solidara kunhelpo. Jen fortaj manoj ekprenas la materialon kaj post momento la placo estas malplena.

La supreniro daŭras 3 horojn. Premas la randoj de traboj kaj brikoj junajn ŝultrojn, fluas ŝvito de fruntoj kaj dorsoj, sed obstino kaj energio hardas la volon. Sur la pinto salutas hela suno la bravan aron. Ĉirkaŭ la konstruaĵo kuŝiĝas la armeanoj; brunbrulitaj, muskolaj korpoj streĉiĝas en sunbrilo kaj ree kaj ree ekmuĝas la proleta saluto: "amikecon!"

Monta festo! La Linza armeana kantligo kantsalutas. K-do eksgeneralo Koerner oratoras (Generalo Koerner antaŭ kelkaj jaroj estas eksigita laŭdire pro fino de lia servtempo, sed efektive pro lia socialistemo. Nun li funkcias kiel ĉefa konfidato de la soldatoj en la parlamento kaj armea ministerio je ĉagreno de la armea ministro Vaugoin). Li gvidas la aŭskultanojn el la profundoj de la labortago al la lumaj altoj de la monta libereco, al suno. Pri la kamparana milito li parolas, pri arbitro kaj tiranio de la estinto, pri suvereneco de la popolo, estiĝinta per mizero, sufero kaj bataloj. Soldatoj, laboristoj, ilia devo estas ŝirmi kaj firmigi la junan liberecon de la aŭstria popolo. — Katenu malsupre en la valo, ĵus malaperinta en

Kiel Iljiĉ estis pundita[1]

(Rakonto de aŭtomobilisto, K-do Gil)

En fatala tago de 30-a aŭgusto Vladimir Iljiĉ elveturis, kiel ĉiun semajnon, pro politikaj popolkunvenoj.

Komence ni veturis al la Pana borso, kie estis kunveno. Tie ĉi estis multe da homoj. La kunveno pasis bonprospere, kaj ni forveturis al la fabriko estinta de Miĥelson. Ni enveturis rekte la korton. En ĝi estis multe da homoj. Gardistoj estis nek en la aŭtomobilo nek en la korto, kaj Vladimir Iljiĉ estis renkontita de neniu. Mi turnis la maŝinon kaj starigis ĝin por elveturo je dek paŝoj de enirejo en laborejon.

Post dek — dekkvin minutoj al mi iris virino kun paperujo, — poste, dum juĝesploro evidentiĝis, ke tio ĉi estis Kaplan, — kaj demandis min: "Ĉu, K-do Lenin, ŝajne, venis?" Je ĉi tio mi respondis: "Mi ne scias, kiu enveturis."

[1]) Tiu ĉi artikolo devis aperi fine de aŭgusto, sed la troa materialo, precipe la kongresraporto, iom prokrastigis ĝin. *Red.*

Ŝi ekridis kaj diris: "Kiel ja ĉi tio eblas? Vi estas aŭtomobilisto, kaj ne scias, kiun vi veturigas?"

— Sed mi, kiel scii? Iu oratoro, ĉu malmulte da ili veturas, ĉiujn vi ne ekkonos, — mi respondis al ŝi trankvile.

Ŝi iris de mi kaj mi vidis, kiel ŝi eniris en la fabrikon. Post unu horo el la fabriko eliris granda popolamaso, plejparte laboristoj, kaj plenigis preskaŭ la tutan korton. Mi komprenas, ke la popolkunveno finiĝis, kaj komencis prepari min por forveturo, tuj streĉinte la maŝinon. Post kelkaj minutoj el la fabriko elruliĝis alia granda popolamaso, meze de kiu iris V. I. Mi sidis ĉe la direktilo kaj starigis la maŝinon sur rapidon. V. I. interparolis kun laboristoj, kiuj faradis al li multe da demandoj. Li moviĝis tre malrapide laŭ direkto al la maŝino. Ne alirinte la maŝinon tri paŝojn, V. I. haltis kontraŭ la pordeto kaj intencis sidiĝi. La pordeto estis malfermita de iu el la popolamaso. En tiu tempo li parolis kun du virinoj kaj klarigis al ili pri produktimportoj.

La interparolado daŭris du-tri minutojn. Flanke de V. I. staris ankoraŭ du virinoj, iomete ekantaŭiĝintaj de li. Li estis dense ĉirkaŭita de popolamaso, kaj kiam li volis fari la lastajn paŝojn al la motoro, subite eksonis pafo. Tiutempe mi rigardis V. I. duonturne malantaŭen. Momente mi turnis la kapon laŭ la direkto de la pafo kaj vidis virinon de la maldekstra flanko de maŝino, ĉe antaŭa alo, celanta sub la maldekstran skapolon de V. I. Unu post alia eksonis ankoraŭ du pafoj. Mi tuj haltigis la maŝinon kaj ĵetis min kurante al la pafinto, celante ŝian kapon. Ŝi ĵetis la revolveron al mi sub la piedojn, rapide turnis sin kaj ĵetis sin en la popolamason elirdirekten. Ĉirkaŭe estis tiel multe da homoj, ke mi ne decidis pafi ŝiatingen, sentante, ke certe mi mortigos iun el la laboristoj. Mi ĵetegis min post ŝi kaj kuris kelkajn paŝojn, sed ĉi tie mian kapon eniris: "Ja, V. I. estas sola... Kio okazas kun li?" Mi haltis. Dum sekundo estis timiga, malviva silento. Poste subite ĉiuj ekkriis: "Oni mortigis ... oni mortigis" ... kaj tuj la tuta popolamaso ekmoviĝegis por kuri el la korto — viroj kaj virinoj — kaj fariĝis forta premo. Mi returnis min kaj ekvidis V. I. falinta teren. Mi ĵetis min al li. En ĉi tiuj momentoj la dense plenigita korto

nebula maro, sindono al falsa kredo je aŭtoritato, al imagata tradicio de la homoj; la organizita Laboristaro kaj la soldatoj aspiras supren al la altoj de la homaro, al celo, fiksita antaŭ ni, al socialismo, al liberiĝo de tiuj, kiuj kreas kaj havas komunan volon. Vidigu la estinto je tiu kristkorpa tago denove sian pompon, plenigu la valon per preĝejaj kantoj, pompaj procesioj, kaj incensaj nuboj, ĉi supre sur pinto de la monto sonas nia ĵuro: "Vivu obstino kaj forto!" Solene, fortsone ŝvebas la belegaj agordoj de la "himno al la libero" al la suno ĵus venkanta la nebulon kaj el la valo salutas la klara surfaco de la lago, salutas la domoj sur ties bordo kaj la kabanoj sur la arbaraj deklivoj.

Malsupreniro. Ŝipo reportas la soldatojn al Gmunden. Je la 15-a horo akcepto per la Laboristaro el Salzkammergut. Amikeco! vokas centoj da gorĝoj, flirtas ruĝaj flagoj. Post mallonga saluto al la festloko. Muziko. Sur estrado kuniĝas la laboristkantuloj, soldatkantuloj, gimnastikuloj kaj oratoroj. Salutoj de la partio kaj diversaj organizoj per la reprezentantoj. Generalo Koerner faras la festparoladon. Temas pri solidareco de Laboristaro kaj soldatoj, kiuj man' ĉe man' formas fortikan ŝirmmuron por nia juna demokratio en la popola ŝtato. "Ili minacu!" je la volo de la Laboristaro kaj soldatoj ĉiuj provoj de la reakcio frakasiĝos. Ĉefleŭtenanto K-do Stransky kiel prezidanto de la armeana sindikato parolas en la nomo de la soldatoj. Neniam plu okazos, ke iu reakcia potenco devigos la laboriston en soldata vesto levi la armilon kontraŭ la alian laboriston. Tion unue diru la hodiaŭa festo.

Kaj nun soldato kaj laboristo en blua bluzo etendas al si la manojn salute, klinas super la grupo ruĝaj flagoj, eksonas "himno al la libero". Atakema falango de gimnastikuloj muskolaj kompletigas la bildon, sur kiun kvazaŭ rigardas la bonaj okuloj de nia neforgesebla gvidinto Viktor Adler el granda portreto. Ĥorkantoj de la kantunuiĝoj okupas la restantan tempon. La armeana kantligo el Linz precipe uzas la liberan kanton je ĝojo de la Laboristaro.

Fluge pasis la horoj de solidara kunesto, kaj dum adiaŭo fortaj manpremoj sigelis la interfratiĝon kaj la konscion, kiun alportis tiu tago: Niajn soldatojn kaj laboristojn ne plu disigos kiu ajn reakcia potenco. Do vivu obstino kaj forto!

El "Tagblatt" tradukis *Danubano.*



Misakuzoj malhelpas la laboron de SAT

En n-o 149 de "S-ulo", pĝ. 4, en piednoto al la 7-a komuniko de la Kongresa Komitato estas dirite: "Ni sciis, ke Centra Komitato de SEU (Moskvo) *kolektis* aliĝojn. Sed kial la mono ne trafis nin, nek respondo sekve de niaj alvokoj?"

Tiu rimarko tute ne korespondas al la vera stato de l' afero:

1. CK. SEU *ne kolektis* kotizojn por la VII-a SAT-kongreso, ĉar ĝi ne estis komisiita por tio. Sed ĉar el Sovetio oni povas transpagi monon nur per banko kaj transpago de unu sola kongresa kotizo per banko kostus kvaroblon de tiu ĉi kotizo, K-doj estis sendantaj siajn kongresajn kotizojn al CK. SEU, por ke ĝi peru la kolektivan transpagon de ĉi kotizoj. Same, por helpi al SAT kaj sovetiaj SAT-anoj, CK. SEU peras la tutan monon venantan el Sovetio por SAT.

2. Pri la tuta mono, ricevita por SAT, CK. SEU ordinare trifoje monate komunikas al K-do Lerchner kaj la mono mem estas transpagata al K-do L. ordinare unufoje monate. Same estis per K-do L. transpagitaj ĉiuj kongresaj kotizoj, ricevitaj de CK. SEU. Evidente la Kongresa Komitato, ricevante de K-do L. kongresajn aliĝojn el Sovetio, ne sciis ke tiuj kotizoj estas transpagitaj de CK. SEU. Espereble K-do L. ne rifuzos tion jesigi.

3. Transpagi la kotizojn senpere al Lyon CK. SEU ne havis la eblon, ĉar transpago monate de 5—10 kotizoj postulus altajn elspezojn.

Centra Komitato de SEU prenis sur sin peradon de la sumoj el Sovetio por SAT kun la sola celo — helpi al SAT kaj ĝiaj organoj. Ĝi ne prenas eĉ etan pagon de la SAT-anoj por kovri la elspezojn, postulatajn de la priskribita monperado al SAT. Kontraŭe CK. SEU devas multe klopodi por povi ekspedi la monon al SAT super la sumo, permesita de sovetia leĝo por transpago al eksterlando.

Kiom valora por SAT estas tia perado de CK. SEU oni juĝu el jeno: kiom da membroj havus SAT en Sovetio, se ĉiu membro devus izole, ne per CK. SEU, transpagi sian kotizon egalan nur al 75 kop. kaj elspezi por transpago per banko 3 rublojn (6 germ. markojn)?

Nepripensita piednoto de la Kongresa Komitato povas sekvigi la nekonfidon al CK. SEU, kiel financa peranto de SAT en Sovetio, kaj multaj K-doj, timante sendi monon al SAT per CK. SEU, ne havos alian vojon por transpago, ol individua multekosta pago per banko.

Kongresa Komitato povus eviti publikigon de la misinformanta piednoto, se ĝi antaŭe petus klarigon ĉe K-do Lerchner, per kiu vojo li ricevis kongresajn kotizojn el Sovetio.

Sekretariaro de CK. SEU.

jam malpleniĝis, kaj la pafadinta virino malaperis kun la popolamaso.

Mi alkuris V. I. kaj, antaŭ li genuinte, kliniĝis al li. Konsciecon li ne perdis kaj demandis:

— Ĉu oni kaptis lin aŭ ne?

Li evidente opiniis, ke lin pafis viro.

Mi vidas, ke li demandis kun peno per aliiĝinta voĉo, kun ia raŭko, kaj mi diris al li:

— Silentu, ne parolu, al vi estas malfacile.

En ĉi tiu minuto mi levas la kapon kaj vidas, ke el la fabriko en marista kasketo kuras ia stranga viro, en ekscitita stato, li svingas la maldekstran manon, sed la dekstran tenas en la poŝo kaj kuras rapidege rekte al V. I.

Al mi lia tuta staturo ekŝajnis ekstreme suspekta, kaj mi kovris per mi V. I., precipe lian kapon, preskaŭ ekkuŝis sur lin kaj ekkriis per ĉiuj fortoj:

— Haltu! — kaj direktis kontraŭ lin revolveron.

Li daŭrigis kuri kaj proksimiĝis al ni. Tiam mi kriis:

— Haltu! Mi pafos!

Li, ne alkurinte kelkajn paŝojn ĝis V. I., krute turnis sin maldekstren kaj jetis sin kurante al pordego, ne elprenante la manon elpoŝe. En tiu ĉi momento alkuris min dorsflanke iu virino kun krio:

— Kion vi faras? Ne pafu!... — evidente, supozinte, ke mi volas pafi al V. I. Mi povis ankoraŭ nenion respondi al ŝi, kiam en ĉi tiu tempo el la fabrikoj eksonis krio de iu viro: "Ĉi tio estas nia! nia!" kaj mi vidis tri kurantajn el la fabrikoj kun revolveroj enmane laŭ direkto al V. I. Mi kriis denove:

— Haltu! Mi pafos!

Unu el ili tuj respondis:

— Ni estas fabrikkomitato, Kamarado, niaj!

Ekkonante unu el ili, kiun mi vidis pli frue, kiam ni veturis al la fabriko, mi allasis ilin al V. I. Ĉio ĉi okazis tre rapide.

Iu el ili insistis, ke mi veturigu V. I. en plej proksiman malsanulejon.

Mi kategorie respondis:

— Mi veturigos en nenian malsanulejon. Mi veturigos hejmen.

V. I., aŭskultante nian interparoladon, diris:

— Hejmen, hejmen...

Elrusigis *Olga Magnickaja.*



NIA POŜTO

5448. — Estante ne plu en Bulgario mi ne povas doni informojn pri la vin interesanta demando. Alia SAT-ano en la nomita urbo ne estas.

5254. — Adreson de persono aŭ organizo, kiu povus korespondi pri naftproduktado, ni ne konas. Eble anonceto pri tio en "S-ulo" efikus.

A. P. en Wattens. — Via indigno kontraŭ la franca konsulejo, kiu, pro via itala nomo kaj laboristeco, rifuzis al vi la vizon por viziti la kongreson, estas justa. Sed gardu vian koleron por la tago de l' repago, pri kies pliproksimiĝo vi devas despli multe labori.

Lab. Gr. Innsbruck. — Tiajn anoncojn ni akceptas nur kontraŭ pago. *Red.*



MEMORNOTO

Represis el "Sennaciulo":

L'Effort, Lyon, 15. 7. 27: Proleta ŝtato honoras Esperanton; 15. 7. 27: Sub la jugo de orkolumaj sinjoroj. — *L'Emancipateur*, Bourges, 14. 8. 27: Proleta ŝtato honoras Esperanton. — *Le Libéré*, Nice, 31. 7. 27: Sub la jugo de orkolumaj sinjoroj. — *Le Matérialiste*, Bruxelles, julio 27: Proletariaro kaj religio; aŭgusto 27: Eksiĝoj ĉe eklezio. — *Le Cri Populaire de l'Oise*, Creil, 28. 8. 27: Eksiĝoj ĉe eklezio. — *L'Action Laïque*, Saint-Etienne, aŭgusto 27: Ĉu nur en Polio? — *La Unuiĝita Tuthomaro*, Hamburg, aŭgusto 27: Manĉurio.

Enhavis notojn pri SAT:

The Shop Assistant, 27. 8. 27 (Kongreso menciata). — *Sächsische Arbeiter-Zeitung,* Leipzig, 2. 9. 27 (Kongreso kun foto de kongresanaro).

Enhavis priesperantajn artikolojn:

New Yorker Volkszeitung, New York, 16. k. 17. 8. 27 (Danzigo k. Sovetio honoras esperanton, de Klaĝin). — *Revista Popular,* Córdoba, I. 9. 27.

Represis priesp. informojn, artikolojn kaj notojn:

Le Cri Populaire de l'Oise, Creil, 31. 7., 14. 8., 21. 8., 28. 8. 27 (Antaŭparolon de H. Barbusse al "Cours Rationnel"). Tre vigle propagandas en ĝi nia K-do G. Marais). — *L'Emancipateur,* Bourges, 17. 7. 27. — *Le Populaire, Paris,* 4., 8., 11., 18., 25. julio; 1., 7., 8., 19., 29. aŭgusto. — *Le Peuple de la Loire,* Saint-Etienne, 17. 7. 27.

RECENZEJO

Esperanto, 50 ausgewählte Handelsbriefe, von Professor P. Christaller. Eldonis: Wilhelm Violet in Stuttgart, Germ. Formato: 12×18 cm., pĝ. 32. Prezo 0.75 mk. g.

La konata germana vortaristo, Profesoro Paul Christaller, prezentas al ni ĉi tie esperantan tradukon de 50 modelaj leteroj pri komerca korespondo. En la fino estas aldonitaj "Konsiloj al firmestroj kaj prokuristoj". Laŭ lingva vidpunkto ĝi estas modela, la nomo de la tradukinto akademiano sufiĉe rekomendas ĝin. Admirindaj tamen estas la germanaj esp-istoj, precipe ili superŝutas nin per tiaspeca literaturo, kvazaŭ la mondo devas nur komerci! *I. H. K.*

ALVOKOJ

AL SOCIALISTAJ GEK-DOJ!

Ĉiuj el ni devas konsenti, ke nur la *pergazeta* propagando altiras al ni novajn adeptojn; nia propagando celas esence: en la ĵurnaloj larĝe klarigi nian vidpunkton pri la nuna kontraŭstaro al kapitalistara atako — solvo: esperanto, unuigonta kaj plivigligonta ĉiujn laboristamasojn. Ni ankaŭ ne devas kaŝi al la legantaro, ke ni ne opinias same kiel iaj gvidantoj, kiuj limigas la revolucian salton al fordetruo de la kapitalisma sociordo. Ni diru malkaŝe, ke tiu sociordo iom post iom kreis la lingvojn, do tiuj lingvoj kaj la nacioj ilin kreintaj devos malaperi samtempe.

Sed iaj gazetoj ĝis nun ne akceptis niajn artikolojn; ili verŝajne opinias nin kiel negravajn proletariajn erojn.

La centra organo de Socialista Partio Francia "Le Populaire" ne elmontras al ni grandan simpation. Neeble estas fruktodone propagandi en ĝi, kaj tial ni ne povas efektivigi la ekvilibron de l' fortoj.

Ni do pensis, ke ni povus al tiu grava gazeto montri nian ekziston jenmaniere: Le Populaire jus starigis longdaŭran monkolekton cele plifirmigi sian financan bazon. Ni kolektu la monoferojn de ĉiuj socialistaj esperantistoj, ilin ni amase sendu! Tiele la gazeto verŝajne atentos nin, niaj artikoloj estos presataj, kaj esp-o disvolviĝos en soc. rondoj.

La disvolviĝo de nia movado ampleksas la mondon; tial ni alvokas ĉiujn Gek-dojn, kiuj volas vidi esp-on alprenata ĉe sia Partio.

Ĉion sendu antaŭ la 1-a de oktobro al K-do *F. Chamarre,* 38, rue St. Nicolas, *La Rochelle* (Francio). Ĉiu donacinto ricevos atestajon. *SAT-ano j 2304 k. 9515.*

*

AL ĈIUJ ALILANDAJ GEK-DOJ!

La 15-an de oktobro oni intencas organizi por varb- kaj propagandcelo kunvenon en Vierzon. Por havi plenan sukceson, ni alvokas tutmondajn Gek-dojn, asociojn kaj esp. grupojn sendi poŝtkartojn aŭ letersalutojn. Ni opinias, ke ĉi alvoko ne estos vana kaj ke ĉiuj veraj propagandemuloj sendos salutojn. Skribu laŭ jena adreso: Esperanta Laborista Grupo, Bourse de Travail Unitaire, *Vierzon* (Cher), Francio. *5820.*

ENHAVO:

Laboristaj kondiĉoj en Suda Afriko, trad. Trinaŭkvinok . . . . . . pĝ. 1
La rekonstruado de la Sofia "katedralo" de I. H. K. . . . . . . „ 2
Germania super ĉio!, de 1851 . . . . „ 3
El Bulgario de Ardin . . . . „ 3
Jugoslavio — lando, kie oni mortas pro malsato de Bubo . . . . . „ 4
Letero el Turkio de Milcent Okdek Ses . . . . „ 4
Meksikio, laŭ informservo de ILA. . . „ 5
Mia vivo de 7786 . . . . „ 6
Soldata renkontiĝo, trad. Danubano . „ 6
Kiel Iljiĉ estis vundita, trad. O. Magnickaja . . . . „ 6
Misakuzoj malhelpas la laboron de SAT, de CK. SEU . . . . „ 7
Nia poŝto, Memornoto . . . . . . „ 7
Recenzejo, Alvokoj, Korespondado . „ 8

K * O * R * E * S * P * O * N * D * A * D * O

Unu enpreso: Simpla trilinia anonco kostas 0,50 mk. or., ĉiu plia linio la samon. Ni nur akceptas anoncojn kun samtempa pago.
L = letero, PK = poŝtkarto, PI = poŝtkartoj ilustritaj, PM = poŝtmarkoj, bfl. = poŝtmarko sur bildflanko, k. ĉ. l. = kun ĉiuj landoj, esp-aĵo = esperantaĵo.
Ĉiuj petantoj pri korespondado havas la devon, nepre respondi almenaŭ unu fojon al ĉiuj petoj koncernantaj la fakon, por kiu ili sin enskribigis.

Aŭstrio.

K-do *J. Postl,* Paulusgasse, 5/13, *Wien, III.,* dez. koresp. nur kun ekstereŭropanoj, L, PK, PI, bfl. Resp. garantiata.

Britio.

K-dino *Osmond* (9886) *London,* bedaŭrinde ne havas tempon por plenumi la dezirojn de ĉ. K-doj, kiuj multnombre skribis al ŝi. Aliaj bonvolu ne skribi.

Bulgario.

K-do *T. D. Popov,* (20 j. fraŭlo) str. Čerkovna, *Karnobat,* dez. koresp. k. ĉ. l. pri lab. temoj, L, PK, PI.

Ĉeĥoslovakio.

K-do *Franz Scheufler, Warnsdorf Nr. 301/III.,* dez. koresp. PK, PI, bfl. k. ĉ. l.

K-do *Karl Urban, Warnsdorf Nr. 356/III.,* dez. koresp. PK, PI, bfl. k. ĉ. l.

Francio.

K-do *J. Coignard,* 27, Rue de Montreuil, *Versailles* (S. et O.), dez. koresp. kun K-doj en flugmaŝina industrio, precipe el Sovetio; nepre resp.

Germanio.

K-do *Walter Bräuer,* Anna-Esche-Str. 1-a b. Roscher, *Limbach i. S.,* dez. koresp. L, PK, PI, k. ĉ. l.

Adresŝanĝo: K-do *Kurt Reichert,* Geibelstr. 17, II., *Dresden, 30,* "koresp. de R. H." (antaŭe en Klotzsche).

K-do *Wilhelm Reffgen,* Jahnstr. 82, *Düsseldorf,* dez. koresp. k. ĉ. l. pri ĉ. temoj. Resp. garantiata.

Latvio.

K-do *Aleksandro Kosterov,* Maskavas iela, 221, dz. 11, *Riga,* dez. koresp. pri ĉ. temoj, L, PI, k. ĉ. l.

Rumanio.

K-do *Emanoil Catz,* str. Petru, 23, *Braila,* interŝ. PM kun la tuta mondo, koresp. L, PI.

Sovetio.

K-do *Jakov Vlasov,* Dom Sovetov, Niz 18, *Ŝadrinsk,* Uralsk. obl., dez. koresp. pri ĉ. temoj kun junularo de ĉ. l.

K-do *A. Kovalenko,* Boriĉev-bok, 30, 2, *Kiev,* dez. daŭrigi sian koresp-adon, pro malsano li ne povis resp. al siaj korespantoj.

K-do *Ovrucki,* (junkom-isto) Lavra, Tipografia Giz., *Kiev,* dez. koresp. pri ĉ. temoj k. ĉ. l.

K-do *K. Sergiev,* 7-a Matrosskaja, 21, *Vladivostok* (Ekstrema Oriento), dez. koresp. k. ĉ. l. pri tekniko, scienco k. arto, L, PI.

Adresŝanĝo: K-do *V. Juŝmanov* (studento), Urala Politeknika Instituto, *Sverdlovsk,* (antaŭe en Krasnoufimsk).

K-do *Bazilo Pokrovski,* Brasovski teknikum, *st. Brasovo,* Brjanskoj gub., dez. koresp. pri terkulturo, lab. k. junul. mov., vivo, novaj okazintajoj ktp. L, PK, PI, gaz. k. ĉ. l.

ATENTU! Urba junkomunista organizo, nombranta 29 ĉelojn en fabrikoj, institutoj k. lernejoj koresp. individue k. kolektive k. ĉ. l. Resp. garantiata. Adr.: *Junkom. Komitato,* str. Puŝkina, 70, *Barnaul* (Sibirio).

ATENTU! Distrikt-komitato de "MOPR" (I.R.H.), nombranta 250 ĉelojn en fabrikoj k. institutoj koresp. k. ĉ. l. kolektive k. individue pri "Mopr-temoj". Resp. garantiata. Adr.: *Okrujkom* "MOPR", *Barnaul* (Sibirio).

K-do *A. Savkin,* Vasilevskaja, 75, *Kamenskoje,* Dneprop. okr., dez. koresp. pri ĉ. temoj k. ĉ. l.

K-do *Johano Palaŝĉuk,* elektra provizejo, Gos. Metallurg. Zavod, *Kramatorskaja,* Donbass., dez. koresp. k. ĉ. l., resp. garantiata.

— Ni serĉas seriozan, gajan k. daŭran koresp-adon pri div. temoj k. ĉ. l., resp. garantiata. Skribu al adr.: *Dnepropetrovsk,* Esperanto-Komitato de SEU (Por Labesko), Prosp. K. Markso, 98, loĝ. 12.

Usono.

Adresŝanĝo: K-do *Willy Sieler,* 48, Schubertstr., *Binghamton, N. Y.* (antaŭe en Gera, Germanio).

Ĉiu laborista esperantisto
ŝatas havi por sia propaganda laboro
jubilean esperanto-poŝtmarkon de USSR.
Sendu al adm. de SAT, K-do Lerchner, 0.50 g. mk. kaj al vi senpere el USSR. estos sendita poŝtkarto kun bildo de la marko kaj afrankita per la bela marko mem.

Presejo: Uns-Produktivgenossenschaft, Leipzig (Germanio)